# la informilo

***

## informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto


eldonisto:

ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture

27, rue de la République, 54000 NANCY F

PĈK - CCP: 1997-72 W NANCY


nouvelle série
trimestriel
4ème tr. 1978
N°24

abonnement
un an: 12 F
UNU JARO: 12 F
(8 INTERN. KUPON.)


## ANTO.... FLASH ★ ESPERANTO .... FLASH ★ ESPERANTO

### COLMAR pavoisée aux couleurs de l'espéranto

C'est en effet dans la charmante cité alsacienne -une des villes les plus ensoleillées de France- que se réuniront cette année les Espérantophones de l'Est. La Fédération qui comprend 8 départements y tiendra son Congrès annuel les 21 et 22 avril 1979.

A la veille de graves décisions concernant l'Europe de demain, les Espérantistes entendent bien redoubler d'efforts pour promouvoir leur langue universelle à tous les échelons de la vie communautaire européenne et mondiale.

C'est dans cette optique particulière que le Congrès de Colmar sera précédé durant une semaine, d'une exposition qui se tiendra dans les salons de la Chambre de Commerce et d'Industrie. Le samedi 21 avril au soir, le public pourra s'informer et participer à une conférence-débat sur le thème: "l'Espéranto, outil privilégié de la communication permanente entre les hommes".

Ce numéro de la INFORMILO contient un bulletin d'adhésion au Congrès.

*APRES LE LUXEMBOURG ET LA VILLE DE STUTTGART, c'est au tour de NANCY d'éditer en langue espéranto, au cours des dernières semaines, un dépliant à usage touristique. D'une conception résolument moderne -la photo de la page frontale est un régal pour les yeux- ce document rassemble en 10 pages tout ce qui peut rendre service au visiteur étranger parlant l'espéranto*

*On peut se procurer ce dépliant auprès de l'Office de Tourisme, 14, place Stanislas, 54000 NANCY.*

toute la rédaction de "la Informilo" vous présente ses meilleurs voeux pour 1979!!

IMPORTANT SUCCES DU 8ème STAGE D'ESPERANTO PARLE qui s'est déroulé à Nancy en décembre dernier. 70 participants -le maximum que la MJC Philippe Desforges pouvait accueillir- ont en effet suivi avec assiduité les 4 cours de de degrés différents échelonnés sur 48 heures.

Les stagiaires ont eu le plaisir d'entendre, au cours d'une soirée-cabaret offerte à tous les usagers de la MJC, le chanteur suisse Olivier TZAUT, lequel était par ailleurs responsable du cours d'espéranto accéléré du 3ème degré.

Le prochain stage, qui comprendra également un cours d'initiation à la langue internationale, se déroulera les 23 et 24 juin prochain.

*L'ESPERANTO, LANGUE DE TRAVAIL A PART ENTIERE du Mouvement des Techniques pédagogiques FREINET.*

*Le bulletin spécialisé n° 10 de décembre s'avère d'une richesse extrême. Presque exclusivement rédigé en espéranto, on y découvre des textes écrits et illustrés par des élèves d'écoles hollandaises et japonaises. De plus en plus nombreux sont les inst tuteurs qui utilisent l'espéranto pour mettre leurs classes en relation avec celles d'autres Pays. La prochaine R.I.D.E.F. (Rencontre Internationale des Educateurs Freinet) se tiendra à LANDERNAU en Bretagne, du 7 au 17 juillet prochain, avec la participation assurée d'instituteurs Polonais, Suédois, Hollandais, Allemands, Suisses, Portugais et Hongrois.*

SCHUBERT CHANTÉ EN ESPERANTO!

Au cours d'un Concert au Conservatoire de la Chaux de Fonds (Suisse), le chanteur Fred Stachel a interprété en espéranto les Lieder du "WINTERREISE de Schubert. Lorsqu'on connaît les problèmes spécifiques auxquels se trouvent confrontés les traducteurs de ces oeuvres, on ne peut qu'apprécier la performance linguistique d'une part, de la poétesse Mad Mévo et de Fred Stachel sur le plan vocal d'autre part.

*UN APPEL AUX JEUNES ESPERANTOPHONES... et aux moins jeunes!*

*Fondé en 1952 par "Tonton" Chareille, Président de la Chambre des Métiers de la Creuse, l'oeuvre du MOULIN DES APPRENTIS a rassemblé en 25 années 13000 jeunes gens venus de 83 pays! Ils ont remis en état 25 moulins sur la rivière pittoresque ou sur ses affluents. Les responsables se sont tout naturellement tourné vers l'espéranto, persuadés que la langue de Zamenhof ne pouvait que consolider les relations humaines et la solidarité agissante sur les chantiers. Ces derniers, d'activités très diversifiées, sont organisés chaque été dans ce site touristique attachant. C'est ainsi que du 15 au 30 août prochain, 25 jeunes Polonais, qui ne parlent que leur langue et l'espéranto, seront les hôtes du "Moulin de Piot"... et aimeraient rencontrer sur le chantier des interlocuteurs espérantpphones.*

*Tous renseignements sur ces chantiers contre enveloppes timbrées + 5F en timbres à: MOULIN DES APPRENTIS, 23220 BONNAT Creuse.*

UN NOUVEAU TIMBRE-POSTE SUR L'ESPERANTO...

Après le timbre sur le 63ème Congrès Universel de VARNA (Bulgarie) d'une valeur de 13 stotinkis imprimé en août dernier à quelques milliers d'exemplaires, la poste helvétique édite à son tour (le 21 février) un timbre de 0,70 FS que les Congressistes rassemblés à Lucerne en juillet prochain pourront se procurer dans des variantes philatéliques diverses (enveloppes 1er jour, oblitération avec flamme spéciale, etc...) Ce timbre sera diffusé à plusieurs millions d'exemplaires

# nia venonta 38ª federacia kongreso ★

— Ĝi okazos en COLMAR sub la honora prezidanteco de lokaj aŭtoritatuloj, sabaton la 21an kaj dimanĉon la 22an de aprilo 1979.


— Ne estas tro frue por paroli pri ĝi kaj submeti al niaj gefederacianoj la projektitan programon.

— Ni, en COLMAR, pensis, ke nia jara kunveno devus esti utila ne nur por niaj federaciaj aferoj sed ankaŭ por propagandi eksteren. La trafa ekspozicio preparita de nia samideano P. DENIS donis al ni tiun ideon. Ni decidis sekve altiri la atenton de la publiko, helpe de tiu-ĉi ekspozicio, dum almenaŭ la daŭro de unu semajno antaŭ la kongrestagoj. Multaj gazetartikoloj kaj personaj kontaktoj invitos al la vizito. Ni multe esperas pri tiu "Première".

— Sed tio ne sufiĉas al ni. Ni volas frapi la najlon ankoraŭ pli kaj pli forte! Sabaton la 21an je la 20h30, ni organizos publikan, franclingvan prelegon pri ESPERANTO. La prelegantoj estos niaj amikoj CANCEL kaj LUDWIG. Ili ambaŭ povos sufiĉe interesigi la ĉeestantaron por inciti ĝin al multaj reagoj kaj demandoj.

— Bonŝance kaj dank' al samideano CANCEL ni trovis taŭgegajn lokojn por la ekspozicio por la publika prelego kaj la kunsidoj de la estraro: temas pri la salonoj de la C.C.I. (Chambre de Commerce et d'Industrie = Komerc- kaj Industri-ĉambro) troviĝanta sur la stacidomo-placo do facile trovebla.

— Kompreneble tiuj novaj aranĝoj ŝanĝos iomete la kutiman programon de la Kongreso.



*la programo kaj la aliĝilo estas aparte enŝovitaj en ĉi-tiu numero!!*

---

PERKORESPONDA KURSO (unuagrada)

La 12 jenaj gelernantoj de la lasta lernejjaro (1977/78) finlernis aŭ estas nun finlernantaj la unuagradan kurson:

*Sr° Alain GASTON (57 ABRESCHWILLER) gvidita de S-r° GREINER (TOUL)*
*S-in° Marie-Claude JEANMAIRE (52 CHALVRAINES) gvidita de S-r° LERDUNG (PFASTATT)*
*S-r° Hubert von MATT (68 MULHOUSE) kaj S-r° Jean-Louis LEROY (71 CHALON SUR SAONE) gviditaj de S-r° DEGUÎNES (LA BRESSE)*
*S-r° René GUILLAUME (54 PONT St VINCENT) kaj S-r° Bernard VIVIER (54 JOEUF) ambaŭ gviditaj de S-r° DEGRELLE (NANCY)*
*S-r° Jean-Marc WASSMER (68 VIEUX THANN) kaj S-r° Didier SCHAEFFER (67 EPFIG) gviditaj de S-r° LUDWIG (MUNSTER)*
*S-r° Daniel SCHMITT (67 HAGUENAU) kaj F-in° Christine RUCH (67 HOTTERSTAHL) ambaŭ gviditaj de S-r° MEIER (WICKERSHEIM)*
*S-in° Huguette DEGRYSE (52 CHAUMONT) gvidita de S-r° REMY (LUXEUIL)*
*S-r° Gérard GRANDIDIER gvidita de S-r° GODART (ambaŭ en 88 SAINT-DIE)*

*Kvin el tiuj gelernantoj partoprenis la 7an staĝon kaj 3 la 8an en NANCY en kursoj A2 aŭ eĉ B.*

*Gratulojn al ĉiuj gelernantoj kaj instruantoj!*

*JP COLNOT*

El la ĉi-supraj rezultoj koncerne la perkorespondan kurson, ni rimarku, ke 6 gelernantoj sukcesis per la Ferez-kurso kaj 6 per la nova Racia Kurso. Ni ne forgesu, ke 35 aliaj gelernantoj pli malpli paneas per la Ferez-kurso, kaj 19 per la racia!

Dum la antaŭa jaro same, 6 gelernantoj finlernis per la Ferez-kurso, 6 per la racia sed bedaŭrinde 26 ĉesis la lernadon per la 1a, nur 13 per la 2a kurso.

resume: la rezultoj estas pli bonaj per la Nova Racia Kurso, se oni konsilas ĝin al kleraj gelernantoj.

.../...

*novaj kotizoj:*

*Pro la altiĝo de la poŝtaj tarifoj (ĉirkaŭ 20-25%) kaj de la Nova Racia Kurso (50%) ni devis ŝanĝi la kotizojn de nia perkoresponda kurso por la lernej-jaro 1978/79)*

*Nun 65F por la Racia Kurso kaj 45F por la Ferez-kurso (la skizo de la kalkulo estas jena: 25 poŝtmarkoj -do nun 1,20F X 25 =30F- por la funkciado de al kurso plus la materialo afrankita).*

*Novaj cirkuleroj estas eldonitaj. Ili estas je via dispono, se vi deziras konigi nian kurson ĉirkaŭ vi. Pro la preparo de la decembra staĝo, mi ne povis multe diskonigi la kurson ĝis decembro.*

*JP C*

---

nancy— nova Esperanto-prospekto (E°-Gazetoj bonvolu represi)

La Turisma Oficejo en NANCY ĵus eldonis novan 10-paĝan ilustritan prospekton tute en Esperanto. Ĉiu interesato povas ricevi ĝin senpage. NANCY situas en Nord-orienta Francio, ĝi estas eŭropa vojetapo inter Benelukso aŭ Germanio kaj Mediteraneo unuflanke, aŭ inter Benelukso kaj Svislando, aŭ Germanio kaj Parizo aliflanke. NANCY posedas interesajn muzeojn kaj monumentaron de la 18a jarcento, kaj ĝi estas alirpunkto por belegaj ekskursoj. Antaŭ ol viziti NANCY, avertu la lokajn E°-delegitojn.

Por ricevi la prospekton oni turnu sin al:

TURISMA OFICEJO - 14 place Stanislas F 54000 N A N C Y

---

INFANA TAGO EN TOUL

La 21an de majo okazis infana tago, kies ĉefaj celoj estis la pliboniĝo de la internacia lingvo kaj ankaŭ okazo revidi sin, ĉar la geinfanoj, kiuj antaŭe kune lernis ĝin, poste transloĝiĝis kaj pro tio lernas dise.

Matene ni veturile alvenis en la arbaron interne de la natura parko de LORENO sed nebulo nevidebligis preskaŭ ĉion. La ĉefa ludo estis spurludo; laŭ indikiloj la infanoj devis trovi sian vojon kaj trovi kaŝitan mesaĝon.

Bedaŭrinde spite al la malsekaj kreskaĵoj kaj al la malsekeco la infanoj tro entuziasmis kaj ekkuris lasante la kompatindajn knabinojn malproksime malantaŭ si, forgesante multe da mesaĝoj kaj multe da indikiloj. Baldaŭ ĉiuj perdis sin!

Maltrankvila mi devis serĉi la infanojn tra la arbaro sed neniun trovis! Kiam mi revenis al la veturilo...ĉiuj estis manĝantaj kaj ridantaj!!... ĉar ili returne venis antaŭ mi!

Posttagmeze alvenis la suno kaj post kolektado de konvaloj kaj post diversaj ludoj ĉiuj ricevinte donacetojn reveturiĝis promesante reveni venontan jaron.

G. GREINER

---

KURSO EN MUNSTER

Ĉi-jare 18 gelernantoj ĉeestas la elementan E°-kurson. Tri kursanoj de la lastjara kurso daŭrigas la studadon kaj korespondas kun amikoj en la tuta mondo. Multaj gelernantoj tuj aliĝis al la kurso post legado de artikoleto en la licea gazeto kaj post prelegeto farita de nia juna salideanino Catherine CANCEL dum beletra kurso. PLie profesorino de la liceo aĉetis la lernolibron kaj ĉeestas la kursojn. Ĉu baldaŭ nova instruantino pri E°?

---

*ESPERANTO - SEMAJNO KAJ AŬTUNA AGADO POR ESPERANTO*

*Kiel vi scias UFE aranĝis ĉi-jare 2an E°-semajnon komence de oktobro. En NANCY ĝi okazis oficiale per provo malfermi 2 kursojn la 26an de oktobro sed verdire ĝi komenciĝis unu monaton pli frue per eldono de novaj cirkuleroj, gazt-artikoloj kaj preparo de afiŝ j. Finfine nur 1 vespera kurso funkcias (4 gelernantoj) kaj la licea kurso plimalpli lamas.*

*Krom la kurso en Munster ĉi-supre menciita, artikoloj en la lokaj gazetoj. En PONT-St-VINCENT apud NANCY S-r° GUILLAUME, lernejestro kaj ĵusa perkoresponda lerninto*

☆ **aliĝilo** ☆

**al la 38ª Kongreso de Orienta Francio**

a d h é s i o n
au 38ème CONGRES de la FEDERATION de l'EST

Sr° ☐   Sin° ☐   Fin° ☐

Nomo ____________ Antaŭnomo ____________

Adreso ________________________________

________________________________

Nombro da personoj ________

Nomoj de la akompanantaj personoj

________________________________

Mi rezervas

____ lito(j)n en JUNULDOMO....

... kun littukoj ☐
... sen littukoj ☐

aŭ

____ dupersona(j)n ĉambro(j)n

____ unupersona(j)n ĉambro(j)n

en HOTEL de l'EUROPE

Mi rezervas ______ menuo(j)n je 28F

______ menuo(j)n je 38F

Mi deziras trapasi la jenajn ekzamenojn:

atesto pri lernado ☐

pri praktika lernado ☐

pri kapableco (skriba) ☐

Mi estas kandidato por la renovigo de la Federacia Komitato ☐

✪

supplément à "LA INFORMILO"24

# gravaj informoj

✱ por aliĝi al la kongreso bonvolu sendi la ĉi-apudan aliĝilon ...

pour adhérer au Congrès veuillez envoyer le feuillet ci-contre...

→ Antaŭ la 28a de februaro 1979
→ Avant le 28 février 1979

al Sr° Marcel CUENÉ, 16 av. du Gl de Gaulle

68000 COLMAR

✱ Aliĝkotizo: 15 F po familio

Vi rajtas aldoni al via aliĝkotizo (15F) antaŭan pagoparton por la tranoktado kaj la tagmanĝo... laŭdezire.

✱ La banko-ĉekoj estu je la nomo de Sr° CUENE

La poŝtĉekoj estu sennomaj

✱ Tranoktado: 1/ loĝebleco en Junuldomo, 17, rue Schlumberger (400m for de la stacidomo) en komunaj 4- aŭ 6-litaj ĉambroj...
...kun littukoj: 15F
sen littukoj: 10F

nur 20 litoj estas rezervitaj por la unuaj interesataj aliĝantoj!


2/ loĝebleco en HOTEL de l'EUROPE (stacidomo-placo, apud la kongresejo)...
...dupersona ĉambro: 60F
...unupersona ĉambro: 35F

★ ★

**21an kaj 22an de aprilo 1979** ★

# 38a kongreso de la Esperanto-Federacio de Orienta Francio

**COLMAR**
ĉefurbo de la departemento
**HAUT-RHIN**



**kongreskunsidoj ✱ allogaj vizitoj**

**ekspozicio ✱ libroservo**

**GRAVA, PUBLIKA PRELEGO PRI esperanto**

# programo

SABATON, LA 21an DE APRILO 1979

ek de la 13a: akceptado, placo de la staci-domo

★15a30: malfermo de la kongreso

★16a-18a: kunsido de la Federacia Komitato + LKK + E°kurs-gvidantoj + aktivuloj.

VESPERMANĜO: ... laŭvole.

✱*grava atentigo*: *Ĉar ni deziras reklami por ESPERANTO en COLMAR, ni petas niajn gesamideanojn paroli nur esperanto-lingve, ĉefe dum la vespermanĝo en ia-ajn restoracio aŭ okaze de la promenado tra la urbo. Ni montru, ke esperanto estas vere taŭga lingvo, vere vivanta lingvo!*

★20a30: publika, franclingva prelego pri ESPERANTO en salono de la CCI.

– diskuto.

DIMANĈON, LA 22an de APRILO 1979

★9a-11a30: plena kongres-kunsido

*– raportoj: sekretaria, kasista kaj de diversaj urb-respondeculoj.*
*– diskutoj.*
*– renovigo de triono de la Federacia Komitato, preparo de la Franca E°-kongreso, proponoj, rezolucioj.*

*- ekzamenoj (eventuale)* →

★11a30: akcepto de oficialuloj.
– gazetara prelego

★12a: komuna tagmanĝo

→ *en la restoracio de HOTEL de l'EUROPE, kiu proponas 2 menuojn. je 28F aŭ je 38F (kun* choucroute royale) *sen trinkaĵo.*

→ *la menuo je 38F estos servita nur se sufiĉe da personoj ĝin elektos.*

★13a30-15a30: kunsido de la Federacia komitato + LKK

– renovigo de la estraro

★15a30: fermo de la oficiala programo

– ebleco pri vizitoj:

*urba vizito, vizito al la fame konata muzeo UNTERLINDEN, ktp.*

DUM LA TUTA KONGRESO, LIBRO-SERVO KUN MULTNOMBRAJ KAJ AL-LOGAJ LIBROJ... KE ĈIU ŜPARU IOM DA MONO POR AĈETI ALMENAŬ UNU LIBRON!!

★★★

*kreis novan kurson en unuagrada lernejo kun 15 gelernantoj la 20an de oktobro sed la nombro de lernantoj poste preskaŭ duobliĝis.*

*En METZ S-ro de ZILAH varbis 10 novajn gelernantojn en liceo Fabert kaj 7 lastjaraj progresas. Ekspozicio kaj prelego okazos en la Kulturdomo. Krome Metzaj studentoj planas krei Junularan Esperanto-Klubon en METZ kaj en STRASBOURG.*

*En SELESTAT S-ro GUEGUENIAT gvidas 60 gelernantojn en la liceo.*

*En BAR-le-DUC, S-ino DENIS instruas daŭre en sia klasĉambro en la normala kadro de la ĉiutaga programo la internacian lingvon...kiu enkluziviĝas en la kalkulo de la meznoto monata same kiel la ceteraj kutimaj fakoj. Siavice S-ro DENIS kunigas unufoje ĉiusemajne 15 gelernantojn por la 2a-grada kurso en la mezlernejo kies help-direktoro li estas.*

*Bonvolu nepre informi min por pli detala raporto en LA INFORMILO N°25!*

*JP. COLNOT*

---

## NIA KALENDARO POR LA KURANTA JARO

Jam nun rezervu la jenajn datojn:

- en NANCY, la 25an de marto: Komitata kunveno de la Orient-Franca Federacio
- en COLMAR la 21-22ajn de aprilo: REGIONA ORIENTFRANCA KONGRESO ! !
- en JUNKERWALD la 4-6ajn de majo: 13a Kultura Semajnfino kun partopreno de Marjorie BOULTON...
- en LA CHAUX DE FONDS (Suisse) la 2-3-4ajn de junio: ESPERANTO-TAGOJ, inaŭguro de Internacia Feria Altlernejo.
- en NANCY la 16-17ajn de junio: 9a staĝo de parolata Esperanto
- en LUKSEMBURGO la 7-14ajn de aŭgusto: Kongreso de Internacia Katolik Unuiĝo Esperantista.
- en JUNKERWALD la 28-30ajn de septembro: 14a Kultura Semajnfino.
- en NANCY la 1-2ajn de decembro: 10a staĝo de parolata esperanto...

*...kaj ni supozas, ke vi ne forgesos la UNIVERSALAN KONGRESON DE U.E.A. en LUCERNO (Svisio) de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto... Ĝi meritos almenaŭ unu fulman viziton!*

---

## DEMYTHIFIONS L'ANGLAIS !!! (suite du n° 22)

par le Professeur P.JANTON, titulaire de la chaire d'anglais à l'Université de CLERMONT-FERRAND

"... Une autre illusion sera peut-être plus facile à dissiper. *C'est que l'anglais que vous apprenez puisse vous servir à quelque chose!* Si vos ambitions se limitent à demander votre chambre d'hôtel au portier espagnol, vous avez peut-être des chances de les réaliser, à condition toutefois que ce digne travailleur *soit aussi mauvais en anglais que vous!* Car s'il est meilleur et qu'il parle couramment, vous êtes perdu, vous ne comprendrez pas. Il est bien connu en effet, que mieux on parle... moins on est compris. Prenez les Anglais par exemple. Comme il est malaisé de saisir leurs phrases courtes et rapides où les mots sont escamotés, fondus les uns dans les autres, modulés par des intonations quasi-orientales! Comme vous avez du mal chers élèves, à comprendre l'employé de bureau de la gare ou les explications du guide qui vous fait admirer tel ou tel monument. Et si vous vous égarez sur la lande du Yorkshire *je suis absolument certain que votre anglais ne vous servira pas plus que ne me servit le mien au milieu des marais de Hollande. POURTANT VOUS L'APPRENEZ DEPUIS DES ANNEES! On vous a projeté des films, passé des disques...* Mais voilà: confronté à des situations concrètes dans la réalité anglo-saxonne, vous vous apercevez à chaque nouvelle épreuve *que votre anglais n'est jamais le bon... BIEN QU'ON VOUS AIT FAIT APPRENDRE LE MEILLEUR!*

à suivre

kreis novan kurson en unuagrada lernejo kun 15 gelernantoj la 20an de oktobro sed la nombro de lernantoj poste preskaŭ duobliĝis.

En METZ S-ro de ZILAH varbis 10 novajn gelernantojn en liceo Fabert kaj 7 lastjaraj progresas. Ekspozicio kaj prelego okazos en la Kulturdomo. Krome Metzaj studentoj planas krei Junularan Esperanto-Klubon en METZ kaj en STRASBOURG.

En SELESTAT S-ro GUEGUENIAT gvidas 60 gelernantojn en la liceo.

En BAR-le-DUC, S-ino DENIS instruas daŭre en sia klasĉambro en la normala kadro de la ĉiutaga programo la internacian lingvon...kiu enkluziviĝas en la kalkulo de la meznoto monata same kiel la ceteraj kutimaj fakoj. Siavice S-ro DENIS kunigas unufoje ĉiusemajne 15 gelernantojn por la 2a-grada kurso en la mezlernejo kies help-direktoro li estas.

Bonvolu nepre informi min por pli detala raporto en LA INFORMILO N°25!

JP. COLNOT

---

## NIA KALENDARO POR LA KURANTA JARO

Jam nun rezervu la jenajn datojn:

- en NANCY, la 25an de marto: Komitata kunveno de la Orient-Franca Federacio
- en COLMAR la 21-22ajn de aprilo: REGIONA ORIENTFRANCA KONGRESO ! !
- en JUNKERWALD la 4-6ajn de majo: 13a Kultura Semajnfino kun partopreno de Marjorie BOULTON...
- en LA CHAUX DE FONDS (Suisse) la 2-3-4ajn de junio: ESPERANTO-TAGOJ, inaŭguro de Internacia Feria Altlernejo.
- en NANCY la 16-17ajn de junio: 9a staĝo de parolata Esperanto
- en LUKSEMBURGO la 7-14ajn de aŭgusto: Kongreso de Internacia Katolik Unuiĝo Esperantista.
- en JUNKERWALD la 28-30ajn de septembro: 14a Kultura Semajnfino.
- en NANCY la 1-2ajn de decembro: 10a staĝo de parolata esperanto...

...kaj ni supozas, ke vi ne forgesos la UNIVERSALAN KONGRESON DE U.E.A. en LUCERNO (Svisio) de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto... Ĝi meritos almenaŭ unu fulman viziton!

---

## DEMYTHIFIONS L'ANGLAIS !!! (suite du n° 22)

par le Professeur P.JANTON, titulaire de la chaire d'anglais à l'Université de CLERMONT-FERRAND

"... Une autre illusion sera peut-être plus facile à dissiper. *C'est que l'anglais que vous apprenez puisse vous servir à quelque chose!* Si vos ambitions se limitent à demander votre chambre d'hôtel au portier espagnol, vous avez peut-être des chances de les réaliser, à condition toutefois que ce digne travailleur *soit aussi mauvais en anglais que vous!* Car s'il est meilleur et qu'il parle couramment, vous êtes perdu, vous ne comprendrez pas. Il est bien connu en effet, que mieux on parle... moins on est compris. Prenez les Anglais par exemple. Comme il est malaisé de saisir leurs phrases courtes et rapides où les mots sont escamotés, fondus les uns dans les autres, modulés par des intonations quasi-orientales! Comme vous avez du mal chers élèves, à comprendre l'employé de bureau de la gare ou les explications du guide qui vous fait admirer tel ou tel monument. Et si vous vous égarez sur la lande du Yorkshire *je suis absolument certain que votre anglais ne vous servira pas plus que ne me servit le mien au milieu des marais de Hollande. POURTANT VOUS L'APPRENEZ DEPUIS DES ANNEES! On vous a projeté des films, passé des disques...* Mais voilà: confronté à des situations concrètes dans la réalité anglo-saxonne, vous vous apercevez à chaque nouvelle épreuve *que votre anglais n'est jamais le bon... BIEN QU'ON VOUS AIT FAIT APPRENDRE LE MEILLEUR!*

à suivre

## POST LA 8A STAĜO.... NI JAM PREPARU LA 9AN !!!

— La 8a staĝo do posedis rekordan nombron da partoprenantoj! En 2 kursoj (B kaj C) estis respektive pli ol 25 kaj 20 partoprenantoj! Estonte ni devos iom limigi tiujn nombrojn, ĉar ni ne povas disponi pri pli ol 4 salonoj en la junuldomo, do suplementaj kursoj ne eblos pro manko de sufiĉaj salonoj kaj ankaŭ manko de... kursgvidantoj.

— La 4 kursojn gvidis respektive F-in° Isabelle DENIS (A1), S-in° Camille DENIS (A2) S-r° Olivier TZAUT (B) kaj S-r° Pol DENIS (C). Ni estu dankemaj al ili pro iliasindonema kaj sperta gvidado.

— Nun, por la proksima staĝo (la 16-17ajn de junio) ni bezonus volontulojn kapablajn gvidi la kursojn A1, A2, kaj B. Ĉiu povas mem elekti sian plej ŝatatan metodon por gvidi tian kurson (en decembro, dum ni konservis la "JUNULKURSON" por A1 kaj A2, S-r° TZAUT uzis la tekston de siaj kantoj kaj S-r° DENIS mem multobligis tekstojn pri diversaj aktualaj temoj)

⟹ Do se vi pretas gvidi kurson dum junio, vi anoncu la kurso(j)n, kiu(j)n vi ŝatus uzi, kiel eble plej baldaŭ al:

S-r° J-P. COLNOT, 15 rue de Lavaux, 54520 LAXOU

Antaŭdankon!

## RENOVIGO DE LA KOMITATO DE LA ORIENT-FRANCA FEDERACIO

Nia komitato konsistas nun el 14 komitatanoj. La mandato de la 4 jenaj personoj finiĝas (laŭ alfabeta ordo): S-r° COLNOT, S-r° GREINER, S-in° NAU, S-r° ZIPFEL. Ili estas reelekteblaj. *Tiuj komitatanoj bonvolu anonci, ĉu ili denove kandidatiĝos kaj novaj kandidatoj anoncu sin, ĉu pere de la aliĝilo al la kongreso, ĉu per rekta letero al la prezidanto.* Nia komitato povas konsisti el maksimume 15 personoj. Ni povas do elekti (aŭ reelekti) ĝis 5 personoj en COLMAR.

## NOVAJ DELEGITOJ DE UEA

Eĥe el alvoko de nia sekretario R. DEGRELLE, ni ĝoje sciigas ke Universala Esperanto-Asocio posedas de kelkaj monatoj 3 novajn delegitojn en Orienta Francio:

- Delegito kaj Fakdelegito pri filozofio-orientalismo:

  S-r° Eugène de ZILAH, profesoro, 17 rue Paul Simminger, F 57000 METZ/MONTIGNY

- Delegito:

  S-r° Jacques LINDAU, 4 rue de l'ancien champ de foire, F 57100 THIONVILLE

- Fakdelegito pri muziko:

  S-r° Jean-Luc VANOLA, 50 rue de la Maréchale, F 55000 BAR-LE-DUC


le point Der Spiegel L'EXPRESS TIMES PARIS-MATCH

Jes, bone... sed kial ne aboni revuon semajnan, kiu verŝajne alportos al vi ankoraŭ pli da informoj el la tuta mondo, EN LA LINGVO ESPERANTO MEM?

Tio meritas gravan pripenson, tiom pli ke la elspezo ne superos tiun de abono al unu el la ĉi-supre menciitaj revuoj....

Petu specimenon de SEMAJNO N°0 al Stefan MAUL - VERLAG, Singerstrasse 1/III D-89000 AUGSBURG Fed. Resp. Germanio
(kontraŭ 4 respond-kuponoj aŭ 3 g.m.) → semajno semajno semajno

La subskripcio restas malfermita ĝis la 31a de marto kaj permesas ricevi gravan rabaton (132,- gmk anstataŭ poste 150,- gmk) ... sed ne sendu monon tuj! Nur plenigu la specialan abon-slipon, kiun vi ektrovos en la "N°0".

# AGADRAPORTO 1978*

— *Lastjare la fina frazo de la agadraporto tekstis jene:* Nia komuna konkludo estas nia senlaca laboro.

— *Mi ne scias, ĉu ĉiuj federacianoj orientaj aŭdis tiun eklaborigon, tamen mi povas aserti, ke la laboro estis granda kaj efika: aŭskultu kelkajn ciferojn elĉerpitajn kaj kolektitajn laŭ la apartaj raportoj:*

154 individuaj membroj: rekorda cifero
80 partoprenintoj en la 37a Kongreso Federacia en STRASBURGO
61 partoprenintoj en la 7a staĝo de "Esperanto Parolata"
70 en la 8a.... rekorda cifero!
14 en la UNIVERSALA KONGRESO de VARNA (Bulgario)
249 lernantoj en parolaj kursoj, helpataj de 11 instruantoj
81 lernantoj diversgradaj en la perkoresponda kurso sub gvidado de
19 korektantoj

... entute 330 gelernantoj kun 30 profesoroj: sendube ankoraŭ rekorda cifero!

158 komunikoj, artikoloj senditaj al 13 gazetoj: 90 aperis.
32 esperanto-parolantoj trapasis sukcese la <u>ateston pri lernado</u>
4 la <u>ateston pri praktika lernado</u>
3 la skriban parton de <u>la kapableco</u>

... interalie 130 titoloj ĉarmas en nia federacia libroservo
Pli ol 420 libroj menditaj, liveritaj kaj eĉ pagitaj: facila rekordo ĉar nia libroservo naskiĝis ĉi-jare.

— *Sed nun sufiĉe koncerne la ciferojn, despli ke aparte vi povos aŭdi pri tiuj de la kasisto!*

— *Iom pri la federacia etoso: oni povas rimarki ritme de niaj grupaj renkontiĝoj (kiam ili okazas kiel en Strasburgo, Bar-le-Duc, Metz, Saint-Dié, Mulhouse, eĉ Nancio almenaŭ por kanti...), de niaj staĝoj kaj fine de nia kongreso, ke la aero estas plena je amikeco, gajeco, bonegaj rilatoj: ĉiu konas ĉiun kaj ĝojas revidi la malnovulojn samtempe konatiĝi kun la novuloj. Ni devas tamen streĉi ĉiujn niajn fortojn por ke la junularo kaj la knabaro havu sian plenan lokon meze de la plenkreskuloj: ĉu la bona priaĝa piramido, kiun ni nun konstatas en nia plijunigita federacio speguliĝas en niaj renkontiĝoj? Ni devas labori, pripensi kaj decidi rilate niajn pli junajn samideanojn, por ke ili havu voĉon, lokon. Oni povas sin demandi, ĉu la porknaba komisiono faris sian tutan eblon: sendube punkto diskutinda.*

— *Iom pri la lernolibroj: lastjare ni decidis, ke grupeto stariĝu por studi la eblecon havi pli modernan kaj pli bonan unuagradan kurson. Estus bone, ke la laborgrupeto rakontu iomete pri sia ekmarŝo.*

— *Daŭris la informado cele la deputitojn kaj "ĝeneralajn konsilantojn". Vi ekscios pri tio aparte. Sed ĉu ĉiuj federacianoj sentis sin koncernitaj de la senlaca informado de la popolaj reprezentantoj? Sen ili, sen ilia aktiva apogo, neniam esperanto eniros la lernejojn ĉiugradajn.*

— *Kelkajn vortojn pri la delegitaro en nia Federacio mi volas nun aldoni, ĉar mi opinias, ke la delegitnombro estas tro malsupera rilate la agadon de la federacio: nia federacio ekde la lasta kongreso entenas 8 departementojn. Ĉu vi scias, ke deĵoras delegitoj nur en 5 departementaj ĉefurboj kaj ke urboj kiel Metz, Châlons, Langres estas orfaj? Se ni volas agi sur ĉiuj terenoj, do ankaŭ sur la oficiala tereno, ni devas klopodi, ke ĉiuloke estu unu delegito, almenaŭ en ĉiu ĉefurbo kaj distrikturbo. Ekzemple estas neniu en Longwy, Briey, Toul, Lunéville por nur citi en Meurthe-&-Moselle. Miaopinie tio estas grava manko, ĉar se ni skribas al deputito, al ĝenerala konsilanto, estas necese ke ni loĝu en lia regiono. Kion povas Nanciano, se li skribas al deputito de Longwy? Ni sendube priparolos tion.*

.../...

*Kaj nun al la konkludo: en sia dramo la Norvego IBSEN dirigis al la ĉefrolulo:*
"Kio vi estas, estu tute
ne nur popece kaj ampute!"

*Kio ni estas, ni estu tute: Esperantistoj, kiuj senĉese esperas, senĉese esperigas por ke pli kaj pli da homoj konatiĝu kun la Internacia Lingvo: nia laboro estas laŭgrade de nia espero.*

*Roger DEGRELLE.*

## DU GRAVAJ RENKONTOJ

— 1/ La 20an de novembro, S-in° MAS, S-r°j COLNOT kaj DEGRELLE veturis al METZ por renkonti tie S-r°n LAURAIN, Deputito. Ni pasigis tri kvaronhorojn kun li.

Ni diskutis pri la leĝpropono nova, kiu devas esti deponita surtable de la parlamento.. Li klarigis al ni la meĥanismon de depono de leĝo: kiam parlamentano aŭ parlamenta grupo proponas leĝon, se tiu leĝo estas agnoskita de la registaro, ĝi atingas ĉiujn deputitojn. Faka komisiono (koncerne leĝon pri Esperanto temas pri la "eduka komisiono") diskutas kaj voĉdonas la leĝproponon, kiu poste survojas al parlamento.

S-r° LAURAIN asertis al ni, ke ĉi-tiu problemo de lingvo internacia estas urĝa problemo, kies solvo devus rapide alveni. Li deklaras sin internaciisto eĉ tutmondiisto. Li opinias, ke Esperanto, kiun delonge li konas almenaŭ laŭnome, povas esti la dua vivanta lingvo deviga por ĉiu homo. Li estas konvinkita, ke E° permesas pli bonan ekkonon de nia gepatra lingvo.

S-r° LAURAIN poste asertis, ke tutcerte la plimulto de la deputitoj voĉdonos por ĉi-tiu leĝo: sed ĉu la registaro proponos ĝin al la parlamenta diskuto?

Li ankaŭ estas membro de la Eŭropa Konsilantaro kaj estas preta proponi voĉdonon okaze de kunsido de tiu asembleo. Li priparolos la problemon kune kun siaj kolegoj de la Socialista Partio.

Li agnoskas, ke kiam E° estos deviga lingvo multaj problemoj primonaj mem solviĝos. *(Bonvolu legi tiurilaten la pripensigan, grandan artikolon, kiun publikigis L'EST REPUBLICAIN je la dato 7a de januaro... artikolo en kiu bedaŭrinde nenia aludo al E° estas farita... tion oni nomas objektiveco de l'informado...)*

*- propra aldono de la Redaktoro de la INF°-*

S-r° LAURAIN estas sendube favora al nia ideo, helpos nin en niaj klopodoj kaj bedaŭras, ke liaj tro streĉaj okupoj ĝis nun malebligis lerni la lingvon.

— 2/ La 27an de decembro, S-r° COLNOT kaj DEGRELLE vizitis S-r°n HURIET, ĝenerala konsilanto de Meurthe-&-Moselle. Ni restis kun li dum pli ol unu duonhoro.

Ankaŭ li estas tute favora por deponi leĝproponon sur la tablon de la Generala Konsilantaro. Sed li diris... "Cu tiu momento de ekonomia krizo estas la plej taŭga por proponi rezolucion al la konsilantaro, ne ĉar mi ne kredas je via lingvo sed ĉar aliaj multaj leĝproponoj kaŝos la vian?" Ni rimarkigis al li, ke la Nancia grupo povos poste atentigi la regionan ĵurnalon, por ke ĝi aperigu la leĝproponon.

Li konsentis kaj konsilis nin renkonti alian konsilanton de cetera politika familio kaj kun li li preparos taŭgan tekston.

Ni do renkontos tiun plian homon, sendube ĝissukcese.

Roger DEGRELLE

*PS - Ni invitis al nia staĝo decembra 5 deputitojn kaj 4 konsilianojn... neniu venis sed unu respondis ĝentile... kaj du favore. Rendevuoj jam sekvas por pluraj klopodoj.*

*Aktivuloj en departementoj 51 52 55 67 68 kaj 88 bonvolu klopodi por starigi liston de favoraj deputitoj kaj studi la eblecojn akiri voĉdonon de favoraj rezolu-fare de la departementaj konsilioj kaj informu min.*

*JP. COLNOT*

# LIBROSERVO de Orienta Federacio

*Roger Degrelle*
11, Cours Léopold
54042 NANCY Cedex

Nia libroservo nun posedas 130 (cent tridek) diversajn titolojn. Ni sufiĉe multe disvendis perkorespondo sed ankoraŭ plie okaze de kongreso aŭ staĝo dank' al la afabla helpo de servopretaj virinoj.

Jen la plej venditaj libroj : Nouveau Cours Rationnel : 73 - Dictionnaire Pratique : 40 - Junulkurso : 31 - Suplemento al la Junulkurso : 27 - Paŝoj al Plena Posedo : 17 - Morsoklubo : 12 - Esperanto por Infanoj : 11 - Novaj Esperanto-historietoj : 8 - Grand Dictionnaire Esperanto-Français : 9 - Dictionnaire Léger-Albault : 8 - Savo el la neĝo : 8 - Esperanta Legolibro : 7 - Lexique Fondamental : 5 - Ĉu vi kuiras ĉine ? : 4 - Plena Vortaro : 4 - Lingvaj Respondoj : 4 - Legu kaj ridu : 4 - Fundamento de Esperanto : 4 - Kiel akvo de l'rivero : 3 - La ĝoja podio : 3 - Aktoj de la Akademio : 2 - Al torento : 2 - Cent ĝojkantoj : 2 - Dekkinga fuĝas : 3 - Else kaj Bo : 6 - Ferio kun la morto : 2 - Gaja leganto : 4 - Gizela kaj Roberto : 3 - La granda Kaldrono : 2 - Grete kaj Jep : 2 - Infanoj en Toronto : 2 - Izolo : 2 - Judoj sen mono : 3 - Melodiaro : 3 - La naŭzo : 2 - Ne tiel...sed tiel ĉi : 2 - Nia originala prozo : 2 - La sankta Biblio : 5 - Sekretoj el la marestaĵoj : 2 - La Senlingvulo : 4 - Somera Simfonio : 2 - Sur insulo malproksima : 2 - Taglaborsitoj : 2 - Vole...nevole : 2.

Tamen pri la libro de Schwartz "Vole ... Nevole" mi tuj devas diri, ke nia libroservo vendis la du lastajn ekzemplerojn, kiuj ankoraŭ restis ĉe U.E.A.

Mi faros nun kelkajn rimarkojn : kelkaj libroj nepre malhaveblaj de ĉiuj Esperantistoj restas sur la bretoj de nia libroservo; mi volas paroli ekzemple pri la Fundamenta Krestomatio preparita de Zamenhof mem. Ni vendis nur 4 ekzemplerojn de la Fundamento de Esperanto : ĉu eblas perfekte koni kaj sperti la internacian lingvon sen posedi tiun ĉefverkon ? Aliaj libroj pli ne forlasas la stokon : Lingvaj respondoj de Zamenhof, Plena Vortaro de Waringhien, Kiel akvo de l'rivero de Schwartz ! Nur du personoj (el ili mi!) aĉetis la bonegan verkon de Kalocsay - nia plej elstara poeto - titolitan "Izolo" ! Ĉu valoras daŭrigi ? Tute ne, ĉar pli bone estas rigardi la progreson en la aĉetado de la libroj, kaj en nia federacio estas vera kaj certa progreso!

Ni havas nun la grandan plezuron anonci al vi pliajn aĉeteblajn librojn el bonega suko :

1. William Auld : Pri lingvo kaj aliaj artoj, kie vi povos legi belan prozon entenantan profundajn pensojn koncerne nian lingvon. Mi esperas, ke ĉiuj instruistoj kaj eĉ aliaj serĉemuloj trovos kaj la monon kaj la tempon por gustumi tiujn studojn dank' al kiuj vi iom pli scios rilate nian karan lingvon kaj ties riĉecon kaj ankaŭ rilate la influon de Esperanto sur via karaktero.

2. Wiliam Gilbert : Planlingvaj problemoj 2a eldono, libro priskribanta la stabilecon de Esperanto kompare al Ido, Occidental, Interlingua. Sendube bona libro por tiuj, kiuj deziras pli funde koni la strukturon de Esperanto kaj ties sekretajn ecojn.

3. Bertram Potts : La nova Butikisto de Nukugaia kaj aliaj novaĵoj, la titolo kompreneble diras pri la ĝenro literatura sed ne pri la enhavo kaj la lingvaĵo. Do mi citu kelkajn liniojn de la posta kovrilo : "Por la aperigo de ĉi tiu volumo plia perlo estas ligita al la ĉeno de facillegeblaj verkoj el la plumo de aùtoro el parto de la mondo, kiu cetere meritas pli da atento de la publiko" Fakte Potts vivas en Nov-Zelando ekde 1911. Kaj nun nur du frazoj el la libro por montri al tiuj, kiuj finlernis elementan kurson povos ĝui grandan plezuron legante facilajn novaĵojn : "Fraùlino Boffins, kvindekjara, etstatura, kaj belforma, deĵoris kiel la loka bibliotekistino kaj oficis posttagmeze kaj vespere. Ŝi estis alte respektata pro sia ekzempla konduto kaj morala merito". Vi malkovros, ke oni povas "sekreti langoklake al maljuna vidvo" kaj kiel "eĉ ne unu vorto transsojlas virinajn lipojn" ktp. Sed legu do mem!

4. Ibsen : Brand (en traduko de Norvego), mi lasas la parolon an Kalocsay : "Sendube Brand estas la dramo, en kiu Ibsen venis plej proksimen al la granda tragedio en ties klasika senco. Ĝia leganto alternas inter admiro kaj antipatio, inklino kaj nekompreno, kompato kaj kondamno, kunsento kaj kolero, ĝis kun traskua emocio doniĝas la granda tragedia katarso. La aùtoro eble tiel sukcesis ĉi tie pri tio, ĉar li metis la kernon de la konflikto en la pli mezepokan ol burĝmondan animon de Brand, kaj Brand trovas tie antagoniston al si samformatan : sin meme ... La esperantistaro tamen povas fieri post la traduk-sukceso de Peer Gunt pri nova konkero : la traduko de Brand estas brile adekvata". Se post tiuj vortoj neniu aĉetas la libron, tuj post la unua sunradio printempa mi kuros al la lontodó-flegado !

5. Henryk Sienkiewicz : Tra dezerto kaj praarbaro, kiun vi eble jam konas dank' al TV-filmo projekciita antaù kelkaj monatoj. Temas pri aventuroj de du infanoj ostaĝe forrabitaj fare de araboj kaj sukcese eskapintaj el siaj rabintoj kaj vivriskaj danĝeroj. Staĉjo, dekkvarjara pola knabo, kaj Nel, okjara angla knabino, vivas en Port-Saido kun siaj patroj, ambaù inĝenieroj ĉe la Suez-kanalo ... La verko entenas tre belajn koncizajn priskribojn de naturo, de scenoj el la afrika vivo kaj ankaù plurajn vere dramajn momentojn ... Tutcerte bona libro por geknaboj ... kaj ankaù por plenkreskuloj, kiuj foje bezonas revi.

Ĉi tiujn novajn librojn vi povas jam mendi. Se vi partoprenas en la venonta kongreso kaj memkompreneble deziras ŝpari la sendkostojn, sciigu tion al mi kaj mi kunportos la rezervitajn librojn ĝis la seĝo de via dumkongresa sidloko.

Nun pri prezoj : 1. Auld ĉirkaù 36,00

2. Gilbert : ĉirkaù 21,00

3. Potts : ĉirkaù 30,00

4. Ibsen : ĉirkaù 42,00

5. Sienkiewicz : ĉirkaù 40,00.

Mi nuntempe povas nur "ĉirkaùumi" la prezojn pro la fakto, ke mi ne ankoraù ne perfekte konas pri la kurzo de la belga kaj nederlanda monoj. La prezo dependas ankaù de la francaj impostoj bele nomitaj T.V.A. kaj fine de la sendkostoj : komprenu, ke ne ĉiam estas facile tuj trovi la finan sumon!

DISKO : Veselin Damianov profesia kantisto en la bulgara lingvo aperigias diskon entenantan ariojn de grandaj komponistoj kiel Bizet, Massenet, Musorgskij, kaj aliaj. Li estas akompanata de la pianisto Evgeni Komarov. La bendojn sonorigis la bulgara radio.
Vi povas mendi tiun elstaran diskon ĉe nia libroservo : ĝi kostas 25,00 F.

Mendu... Atendu... Ricevu...

Pagu... Legu... Kaj tiel plu!

## FAITES VIVRE VOTRE PRESSE... abonnez-vous !

*Toutes ces revues sont entièrement rédigées en E°. Celles dont le titre est précédé d'une croix sont à régler directement à* U.E.E. 4bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS CCP 855-35 PARIS. *Les autres pourront être réglées à notre trésorier qui transmettra.*

*(chèque au libellé de la Fédération, envoyé à A. GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM F)*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| + | ESPERANTO | revue offic. de UEA abonnement simple | mensuel | 66F |
| + | KONTAKTO | revue pour adolescents et jeunes gens | 4 n°s | 33F |
| | KONCIZE | bulletin européen pour jeunes gens | 6 n°s | 12F |
| | KULTURAJ KAJEROJ | revue culturelle | 6 n°s | 40F |
| + | HEROLDO DE ESPERANTO | revue d'inform. format journal | 18 n°s | 62F |
| + | HOMO KAJ KOSMO | revue de vulgarisat. scientif. | 4 n°s | 10F |
| + | LITERATURA FOIRO | revue littéraire | 4 n°s | 30F |
| + | SCIENCA REVUO | | | 40F |
| + | JUNA AMIKO | style simple - parfait pour débutants | 3 n°s | 15F |
| | MONDA KARUSELO | nouveau magazine en E° | 4 n°s | 10F |
| | HORIZONTO | revue du "mouvement neutre" E° | | 40F |
| | LA MIGRANTO | bulletin des "amis de la nature" | | 20F |
| + | SCIENCA MONDO | | | 19F |
| + | INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO | | | 22F |
| + | EÙROPA DOKUMENTARO | | | 33F |

*Les revues ci-dessus peuvent être considérées comme neutres vis-à-vis des dogmes politiques ou religieux.*
*Celles qui suivent sont généralement qualifiées"d'engagées"*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| + | BIBLIA REVUO | | | 35F |
| + | OOMOTO | revue japonaise (philos. relig.) | 6 n°s | 30F |
| | ESPERO KATOLIKA | | | 30F |
| | FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO | | | 12F |
| + | DIA REGNO | internationale (protestante) | | 38F |
| | SAT-AMIKARO | bulletin mens. des trav. et syndic. franç. | | 52,50 F |
| | SENNACIULO | même tendance mais international et *"anationaliste"* | | 75F |
| + | EL POPOLA ĈINIO | de Chine Populaire - en couleurs | 1 an | 14F |
| | | | 2 ans | 21F |
| | | | 3 ans | 28F |
| + | LA KANCERKLINIKO | d'avant-garde, politique et culturel | 4 n°s | 24F |

→ *Il est en outre également possible de commander à notre trésorier des petites affichettes de propagande, format 20 X 5,5 cm - 5 textes différents sur papier de 6 couleurs différentes:*

*10 → 2,50 F franco, 40 → 5F, 80 → 9F*




* *Vous pouvez égalements vous procurer des vignettes gommées (4X3cm) de couleur verte. Chaque feuillet comprend 9 vignettes de textes différents.*

*2 feuillets (18 vignettes) 1,50F franco*
*15 feuillets (135 vignettes) 10,00F*

* *Ont également un grand succès des CARTES DE VISITE qui présentent succinctement l'espéranto. On y trouve l'adresse de UFE et un espace blanc vous permet de personnaliser votre envoi.*

*Les 10 cartes* → *2,80 F*

Figurent aussi sur notre catalogue* un ouvrage intitulé "MI AMIS JUNULINON" traduit en plusieurs langues et qui relate la correspondance d'un pasteur et d'un jeune africain sur les problèmes de l'amour et de la morale sexuelle: 11F

et* le lexique bien connu de F. LEGER (*Espéranto-Français*)

1 ex. — 7,80F franco. 2 ex. — 13,50F 5 ex. — 25F
10 ex. — 37,20F 20 ex. — 60,40F

*Ces prix pourront être éventuellement réajustés au moment de la livraison.*




# distra anĝelo



## KRUCVORTENIGMO

"LA FARTO"



HORIZONTALE

1 esti trafita de vintra malsaneto - 2 parto de vesiko/ besteto, kies piko doloriĝas (radiko) - 3 prepozicio/ kiam oni bonfartas, tiel oni vidas la vivon (radiko)/ rompiĝas ofte pro akcidento - 4 interplektiĝo/ sufikso/ trinkaĵo (radiko) - 5 ikonkapo/ miksita anestezilo - 6 prepozicio/ malagrabla korpa sento (fonetike)/ parto de la koro 7 tiel komenciĝas poliomielito/ en pediatrio/ ĉe ambaŭ ekstremaĵoj de osto. - 8 por rapide enirigi iun en hospitalon (radiko) - 9 artiklo/ pronomo/ oni zorge devas prepari ĝin por daŭre bonfarti (radiko) - 10 sufikso/ malpli valora ol sano/ abscesproduktaĵo (radiko)

VERTIKALE

1 ĉiam belaspekta, kiam oni bonfartas/ signas malbonan farton - 2 haŭtomalsano/ medikamenta ŝmiraĵo (radiko) - 3 en la mezo de pilolo/ lasta kuracisto - 4 simbolo de saneco, de fortikeco (radiko)/ sangosuĉanta insekto - 5 komenco de gorĝmalsano/ stato de spirita malordo ofte kaŭzita de febro (radiko) - 6 haŭtomalsano (radiko) - 7 vivmaniero (fonetike)/ la koro estas tiu de nia korpo (fonet.)/ senvokala anemio - 8 en la kerno de korpa likvaĵo - malgranda parto (inverse) - 9 tiu de la vivo ne jam estas klarigita/ preskaŭ nuda - 10 grava malsano/ gorĝspasmo (radiko)

## SILABENIGMO

*Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj" vi plenigu la kolonojn laŭ la donitaj difinoj dekstre. La 1a kaj la 4a kolonoj eldonas proverbon, se vi legos ilin vertikale.*

pi ro

aj ak ak ano di do ei in is ju ka ko la lo mi mo mo nd no o o ob p po po ri rp ru ŝo ta ti tr vu

| | |
|---|---|
| + - - + - - | mola subpiedaĵo |
| + - - + | kolora likvaĵo |
| + - - + - | naski ovon |
| + - - + - - - - | supernacia, politika teorio |
| + - - + - - | plilarĝigi kalibron de dukto |
| + - - + - - - - | atena monumento |
| + - - + - | fiŝo |
| + - - + - - | saltanta insekto |
| + - - + - | frukto |
| + - - + | sekvi ordonon |
| + - - + | vestaĵo |
| + - - + - - - | romia imperiestro |

## SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ

*N°23 - krucvortoj:*

aligatoro karl peki kial irun pendolo la logike laŭ sirg kontoro iu trion agario sinoptiko

*- silabenigmo:*

"se forestas la kato ludas la ratoj"

*N° 22 - krucvortoj:*

planktono iam erare pi refraktoro oriento len totemo post emerite gio ke amendo sl nt tinti tio ir rt oro erg komisiono

*silabenigmo:* "ofte ĉapo de kampulo kovras kapon de saĝulo".

* * *

*imprimé par les soins du SECRETARIAT DES ASSOCIATIONS , 12 rue Voltaire, 55000 BAR LE DUC. Le rédacteur: Pol DENIS. Le Directeur de la publication: Jean-Paul COLNOT. Dépôt légal n° 245*